

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

Enhavo:

Zahari Zahariev: Amo.
Ivan Dobrev: Koĉmaro.
Zahari Zahariev: Nova sento.
Asen Grigorov: Mi. Unua kanto.
Geo Harŝev: En la arbaro.
At. D. Atanasov — Ada: La bogomilismo.
St. Baĝov: La scienco; *Ĥr. Taĉev*:
Masko de la bulgara pentristo Jar. Veŝin;
P. Georgiev: Patrino (ilustr.); Bibliografio;
Enlanda Esperanto-movado k. a.



BULGARAJ ESPERANTISTO

ABONPAGO :
por Bulgario
40 levoj,
por alilando
2.50 fr.
au. egalvaloro

MONATA ORGANO
DE LA BULGARA ESPERANTISTA
SOCIETO

Adreso
de la Redakcio
kaj administracio :
Sofia (Bulgario),
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lerneĵ-bibliotekoj
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

Amo

Ĉu vi estas vidintaj kiom multe da papavoj kreskas preter la fervojaj reloĵ, kiuj preterpasas la Sukeran fabrikon, rampante sur la Ljulinmontajn brustojn? Certe ne, ĉar vi ne ŝatas eliri kaj forlasi la polvozan Sofion.

Kaj mi?

Ĉiuvespere vi povus vidi min sur la makadamo de la reloĵ, kiuj kvazaŭ arĝenta serpento zigzagas kaj perdiĝas malproksimen. Mi ŝirkolektas ruĝajn papavojn, kiuj kreskas inter la oleigitaj traversoj kaj mi ĉiam silentas. Vi ne estas vidintaj kiel ĉarme la sunsubiro reflektiĝas en la arĝentaj reloĵ, vi ne konas la karesojn de la malvarmeta vento, portanta la odoron de miloj da kampofloroj.

Vi vidos min tie ĉiuvespere.

Mi metas oreĵon sur la reloĵn, aŭskultante ĉu ili ektremos. Ili, varmigitaĵ de la jam subirinta suno, karesas dolĉe mian oreĵon, kaj tio estas tiel agraba.

Tiel mi atendas — mi atendas la vesperan vagonaron, kiu revenas Sofion.

Kial?

Mi rakontos al vi malgrandan historieton. Eble ŝajnos al vi, ke ĝi estas fabelo, nekredebla kiel ĉiuj fabeloj kaj tamen mi rakontos ĝin al vi.

Ĉi tie la relvojo estas iomete kruta. La vagonaro venanta de Sofio puh-puh-as kaj moviĝas malfacile kaj malrapide. Sidante apud la relvojo, mi ŝatas rigardi ĝin pasanta, rigardi la homojn, kiuj sendas lastan saluton al Sofio. Kelkiu rigardas min per stranga mieno, alia ridetas al mi.

Mi ŝiras kaj ĵetas al ili florojn.

Unu vesperon, atendante la vagonaron, mi faris grandan bukedon el papavoj, ceĵanoj kaj lekantoj. La reloĵ baldaŭ ektremis kaj la vagonaro aperis, spiregante pro ŝarĝo. Tiun ĉi vesperon estis multaj homoj sur la fenestroj. la festo estis. Sed inter ĉiuj-ĉi homoj de malproksime mi rimarkis ĉe unu fenestro


knabinon kun blonda hararo. Kiam la vagonaro alproksimiĝis, mi ĵetis al ŝi florojn. Ŝi kaptis ilin, ridetis kaj rigardis min iel milde, tre milde. Poste ŝi svingis salute tukon. Longe mi okulsekvis la tukon ĝis kiam la vagonaro tute malaperis

Tio estis iam.

Kaj tamen mi atendas ĉiuvespere la vagonaron, revenantan Sofion, mi atendas la vagonaron, kiu eble alportos la nekonatan knabinon kun blonda hararo.


Mi ŝirkolektas florojn kaj metas orolon sur la reloj. Kaj tio estas tiom agrabla. Tiel mi atendas ŝin. Eble ŝi revenos, aŭ certe mi neniam plu revidos ŝin. Kaj tamen, ĉiuvespere mi atendas, atendas. . . .

Zahari Zahariev



St. Baĝov:

La scienco



Hr. Taĉev: Masko de J. Veŝin

KOĈMARO

Jen man' flamantan levas torĉon,
 jam eksonoras lukta hor,
 kaj teren fluas sang-aŭror
 el forbuĉita ĉielgorĝo . . .

Ĉu oni en la nokto vintra
 disverŝas vinon en ebri? —
 ensorbas ne ĵ glaciĵinta
 minacojn, kriojn de rabi . . .

Ĉu oni strate ekbaraktas,
 ektintas vitroj, trotuar,
 kadavroj sternas ŝtonkvadratojn,
 pafadas are soldatar.

Jen fraton mian trafis kuglo,
 apude staris li en streĉ,
 nun sang makulas blondajn buklojn,
 sangmarĉo brulas sur la neĝ.

Ho, ĉu Moseo rebastonis,
 ĉar nin dronigis sango—mar,
 aŭ min malbenis eble oni,
 ke min torturu ĉi-koĉmar.

Ivan Dobrev

NOVA SENTO

Dum multaj jaroj nia sanga ter'
 la jugon de l' sufer' malgaje trenas;
 tro peza, nigra estas la veter',
 kaj hela tag' ankoraŭ ne alvenas.

Kaj kvazaŭ nin surŝutis tuta mar'
 da trompoj, da mensogoj, da kruelo,
 ke eĉ forgesis blinde la homar'
 jam kio estas Bono, Vero, Belo.

En ĉies vejnoj pulsas tigra gal',
 atakas gento genton tro perfide,
 kaj ĉiam post la besta sangbatal'
 aperas da kranioj piramido.

Stultuloj jugas, buĉas sen indulg',
 vidvinoj, orfoj morte ploras, plendas,
 kaj sur la mond venena pulvnebul'
 kiel malben' terura peze pendas.

Ne, ni ne povas sen libera spir'
 plu vivi, de l' malbono en la reto.
 La suferanta homo kaj martir'
 kun kredo jam atendas la profeton.

Kaj jam naskiĝis li en sklava land —
 fidela ido de la homa gento.
 Mi vidis lin — li per tremanta man',
 finskribis novan sanktan testamenton.

Kaj jen—super la kapo de l' profet'
 ekbrilis forte verda stel' magia,
 kaj en la man' kun harpo de poet'
 ekkantis kanton li pri mond' alia.

Pri l' bela mondo de la sankta ver',
 de la eterna paco kaj fratamo,
 kaj kie reĝos la diin' — Liber,
 kaj kie leĝo estos nur la Amo.

Li kantis pri l'eterna tera Maj',
 kun mir' aŭskultis lin la homa gento...
 Mi ankaŭ aŭdis tiun kanton kaj
 en mia kor' naskiĝis nova sento.

Zahari Zahariy

MI

Ĉiu sekvas post mi, ĉiu fugas de mi,
 mi—fajrujo de l'am kaj avida malam —
 ĉar el mia vejnaro
 gutas dolĉ kaj amaro,
 ĉar mi brilas kaj brulas,
 maltrankvila kaj lula.

Estas mi infana veo,
 son' rikana de leon',
 mondokreo kaj perejo,
 blanka mevo kaj ciklon'.
 Kiel ocean' senlima, —
 plata, glata ebenaĵ,
 el la element mi ŝpinas
 la miraklon de l' miraĝ.

Kaj mi vivas sur ter en katen' kaj liber,
 jen malbona demon', jen adepto de l' Bon,
 Kiel stel' mi brilegas
 tra ĉiela lazuro,
 sed vualojn surtegas
 super min la obskuro.

Estas mi tropika suno
sur la suda firmament,
tamen palas mi aŭtune —
velka veo kaj lament.
Kiam ies man mistera
volas pace ŝirmi min —
krude, per malam infera
min mortigas la Destin.



P. Georgiev :

Patrino

UNUA KANTO

Sur mia frunto
mi portas mian teruron:
tie estas fiksita
kiel senfunda,
fajra okulo
mia kontraŭulo:
vi!
Ho — la bruliga, la neniiga neeviteblo,
de mia plejbono! —

En vi
kaŭras via envio,
kiu frakasadas,
kiu mortbatas
la plej malfortan signon
de ribelanta indigno,
vi, —
infane tirana,
bela kaj kruela,
insida,
tiom perfida en la pardono
Dio de l' Bono!

En la bruego de la ciklonoj,
en la milionoj sonoj
de la krakanta maŝinaro
en la fabrika urbo,
aŭ sur la maro —
perturba
kaj furiozanta
oceano,
kiel malgranda
infano
la patrinon,
mi serĉas — sen fino —
vian mildan bildon, Dio!

Tra la diafane nebula,
melodia lulo
de la molaj violoj —
aŭ en la ekstazo de la kontrabaso,
okazas
mia inicio —
fandiĝa drono
de ĉiu sono kaj koloro
en mia koro.

En la serena mateno
de mia ekzistado,

portate per la hela radio
de la suno —
sonas mia Himno.

Tiam

adoleskanta knabino,
brulanta kaj bruliganta pro pasio
june senkulpa kaj loga kaj ĉarma,
traboras mian koron kaj karnon

per la inspira flamo
de la amo

kaj de la deziro —

mi tiam

genufleksas,

Ĉiopovanta

Dio,

kaj teksas

mian unuan kanton.

Asen Grigorov

En la arbaro

Mi starigas mian tendon en la vasta arbaro, meze de la virgaj pinoj. La bonodoroj de la floroj kaj de la kampherboj, la aromo de la abioj kaj pinoj ebriigas min. Tage mi rigardas la blankajn nubojn kaj nokte mi rigardas la belegajn stelojn.

— — La suno leviĝas kaj superverŝas la verdan arbaron per sia bonfara radiaro. La sunradioj traboras la densejon el virgaj arboj kaj desegnas fabelajn formojn antaŭ mia tendo. La suno varmigas la matenan aeron. Tutaj aroj da muŝetoj gaje zumas, traflugante de floro al floro.

Varmega tago. Mi kuŝas apud la tendo kaj rigardas la blankajn nubojn, kiuj flugas tra la ĉiela oceano. Mi rigardas ilin, ĝuas ilian aspekton kaj en ili mi trovas . . . miajn revojn. La malnovaj rememoroj reaperas, tuŝas mian koron kaj dolĉa mildo ebriigas min kaj mi sentas min portata foren, trans la landoj. De tempo al tempo tiuj rememoroj alblovas en min la penson pri mia hejmo, sed tio ne daŭras longe, ĉar mi ne bedaŭras pri la forlasita urbo, pri miaj parencoj kaj amikoj. Mi scias, ke multaj amikoj miaj loĝas en tiu ĉi arbaro. La birdoj kantas, kantas pri bono, feliĉo, amo . . . Sed vane . . . ilia kantado ne trovas gajan resonon en mia koro kaj pli profunda malgajo premas min. Sed — tio ne ŝajnu stranga — tiu malgajo estas la fonto de mia feliĉo, de mia feliĉa vivo. Jen kiel mi vivas interne.

La varmiga suno subiras okcidenten. La vespera vento ekflustras inter la folioj de la arboj novan kanton. Tiu kanto trovas mildan resonon en mia ŝanĝema animo. La noktaj steloj brilas tra la lazuro, kaj la luno disverŝas sian blankan radiaron. Miaj pensoj flugas super la teraj vantoj, — mi eniras en la regnon de la ombroj, forgesas min kaj serĉas la limojn de la Tutmondo.

Tiel mi pasigas la tagojn kaj la noktojn en la soleca arbaro.

Geo Harŝev

At. D. Atanasov — Ada

La Bogomilismo

(3)

Jen kiel prezentis la bogomila legendo la kreon de la mondo kaj de la homo:

La praeterna Dio havis du filojn: Satanailo kaj Kristo. La pli aĝa, Satanailo, pekis antaŭ Dio per malkontenteco, esprimita en konspiro kontraŭ lia potenco. Dio forpelis lin el la paradizo kune kun liaj kunkulpintoj. Tie ĉi estas klara la modera dualismo.

Satanailo kaj liaj kunuloj iris sur la teron, kiu tute ne estis aranĝita: akvo kovris ĉion kaj teraĵo ne estis. Satanailo komencis aranĝi ĉion, imitante la paradizon, volante krei sian regnon laŭ la modelo de Dio. Li kreis la surteran videblan ĉielon. Li havis krepotencon kaj ĉion kreis per la ekdeziro: „estu!“ Li do aranĝis en sia nova mondo ĉion: tero kaj maroj, bestoj kaj kreskaĵoj. Fine li prenis teron kaj akvon kaj elfaris propramane Adamon. Li starigis la ankoraŭ nesekiĝintan figuron, sed la akvo interne kolektiĝis en unu el la piedoj kaj elfluis el la dikfingro kiel malgranda akvostrieto. Satanailo ne rimarkis tion ĉi. Li enblovis animon al la korpo, sed la animo eliris per la kreita sur la dikfingro truo kaj vivigis la akvostrion, kiu forrampis: tiel estas kreita la serpento. Satanailo provis ankoraŭ kelkafoje enblovi en la korpon animon kaj deteni ĝin, sed vane: ĝi ne povis resti en la korpo. Li multe ekmalĝojis kaj malsereniĝis. Li turnis sin al sia patro, la Dio, por ke tiu ĉi helpu al li vivigi la homon. Dio ekkompatis lin kaj mem enblovis spiriton al la unua homo. La spirito restis en la korpo. Tiel do aperis la homo: korpo kreita de Satanailo, enhavanta spiriton de Dio. Tiu ĉi Dia spirito komencis klerigi Adamon; ĝi sciigis al li pri diversaj belegaĵoj el la alia mondo, la Dia paradizo, el kie ĝi venis. En la homo ĉiam ekzistas batalo inter la Dia kaj la Satanaila elemento, inter korpo kaj spirito. La bazo de la bogomila religia instruo estas la penso: savi la spiriton el la Satanailaĵo, el la tera ŝelo. Tiu ĉi koncepto estas plena de poezieco. (Komparu ankoraŭ la poemon „Angelo“ de Lermontov).

Satanailo kreis el Adamo Evon. Sed li enviis al sia kreaĵo — la homo, kaj rapidis antaŭ li unuigi kun la donacita al li edzino. Sekve de sia unuigo kun Satanailo Evo naskis filon Kaino, kaj poste filinon Kalomelon. Evo havis de Adamo filon Avelo (aŭ Evvelo). Kaino mortigis Avelon kaj enkondukis en la mondon de Satanailo la mortigon.

La peko de Satanailo kun Evo forte indignigis Dion. Pro tio li forprenis de li la pluan kreaĵon kaj forprenis la finon de lia nomo „il“, kiu estis signo de digneco: tiel Satanailo fariĝis nur Satana. Sed Dio lasis lin esti estro sur sia propra mondeto, kiun li kreis. La Satano fariĝis malicega, malaŭfabla, malserena, malameganta.

Kristo venis en la mondon de la Satano por savi la dian animon, kiu estis katenita en la diable-kreita korpo. Li klerigis la animon kaj montris al ĝi la vojon al la savo. La tuta vivo de Kristo sur la tero estis ne reala, sed nur ŝajna. Por trompi la Satanon, Kristo surpronis homan karnon. Laŭ la bogomilanoj li naskiĝis ne reale, sed ŝajne; ili rakontis, ke li naskiĝis el la orelo de la Dipatrino.

Kiel oni vidas, en tiu ĉi rakonto estas multa antropomorfa elemento, t. e. oni prezentas Dion kaj liajn filojn kiel homojn, kun ĉiuj kvalitoj de homo.

Ordinare tio ne estas la natura formo de la pli supera instruo ĉe kiu ajn herezo, tamen la abstraktan instruon oni ne povis prezenti al la malkleraj popolaj masoj, pro tio en ĉiuj herezaj movadoj ekzistis tiu ĉi duobleco: al la simpluloj oni klarigis la ideojn per naivaj fabeloj, al la kleruloj — per filozofiaj rezonoj. Pro tio en ĉiu simila movado la adeptoj estis dividataj je perfektaj kaj prepariĝantaj (оглашени). Ĉe la bogomiloj estis sama divido.

Ni vidu, kio rezultas el la supree montrita legendo:

Ĉio videbla sur la tero, ĉio materia, estas kreaĵo de la malbona spirito, de la Satano. La korpo, la naturo — ĉio. Pro tio ili devas esti malestimataj kaj malzorgataj. La potenco sur la tero apartenas al la Satano; de li estas donita la potenco de la reĝoj, kiel same al la boljaroj kaj al la pastroj. Do, oni ne devas obei tiun ĉi potencon. La temploj estas io materia, ili estas kreaĵo de la Satano. Loĝejo de Dio ne povas esti tiu ĉi materia mondo — verko kaj regno de la Satano. La pastraro servas al pemonoj en la preĝejoj, ne al Dio.

La bogomilanoj ne zorgis pri sia korpo kaj pri la tera vivo. Ili havis modestan vivon. Ilia manĝado konsistis plejparte el vegetara nutraĵo, ili malrekomendis la vinon kaj la viandon. „Eĉ dimanĉe ili fastas“ — parolas Kosma. Tamen plej certe ili nur rekomendis tiun ĉi nutran reĝimon, kaj verŝajne ĝin obeis plejparte la „perfektaj“ bogomilanoj, ĉar malfacile estas kredi, ke en tia epoko la malklera popola maso povis montri daŭran persistecon en manĝa sindeteno.

Rilate al la vestoj, la bogomilanoj same estis modestaj. Iliaj predikantoj vestis sin simple kiel la monaĥoj.

La bogomilanoj estis kontraŭ la ekleziaj ceremonioj kaj kontraŭ la sakramentoj. La oficiala liturgio mankis en la unuaj jaroj de la kristanismo — ili do estas kontraŭ la liturgio. La perkvan bapton ili nomis „lohana“ bapto kaj ne akceptis ĝin. Ili rekonis nur la perspiritan bapton, la nematerian, kiun ili nomis „Krista“ bapto. Kiam iu akceptis ilian instruon, li devis deklari tion publike antaŭ kunveno de iliaj adeptoj — per tio li fariĝis bogomilano.

Ili malestimis la komunion, kiel ce'adon al puriĝo per materiaj rimedoj.

Ili estis unue kontraŭ la geedziĝo en ĉiu forno, ĉar ĝi estis eltrovaĵo de la diablo por daŭrigo de la homa gento kaj firmigo de la regno de Satanilo. Tamen verŝajne tiun ĉi malpraktikan ekstremecon baldaŭ ili forigis, ĉar pro ĝi certe la popola amaso ne tro volonte akceptus la tutan instruon. Sed la virino estis tre alte konsiderata ĉiam de la bogomilanoj: ŝi estis egalrajta al la viro kaj povis esti predikanto, kio estis tuta revolucio el la eklezia vidpunkto. En la 61. prelego Kosma parolas pri tio. En tiu rilato al la virino ni vidas la ĝeneralan konsideron de la virino ĉe la slavo (kompreneble, mi ne parolas pri la esceptoj, sed ĝenerale la virino ĉe la slavo neniam estis en sklava stato).

La bogomilanoj konservis la penton kaj la preĝon. Sed la konfeson kaj la penton ili faris ne antaŭ unu persono, sed publike, kio havas sendube tre grandan edukatan signifon. Ili rekonis nur la preĝon „Patro nia“, kiun ili ripetadis silente, en adorado kaj sinforĝeso.

Zigaben rakontas, ke ili preĝis tage sep fojojn, nokte kvin. Ĉu tamen tion sekvis fidele la tuta adeptaro, tio estas tre dubinda. La sama verkisto diras, ke la bogomilanoj rigardis al la novekonvertitaj kiel al bestoj („porkoj kaj hundoj“); ili purigis ilin per fasto kaj preĝado kaj tiel igis ilin indaj, ke oni konfidu al ili „la sanktaĵon kaj la perlojn“.

La evangelian rakonton la bogomilanoj akceptis ne kiel faktojn — precipe pri la mirakloj de Kristo — sed kiel alegorion. Tiun tendencon raciigi la evangelion ni rimarkas en multaj herezoj. Tamen mi devas noti, ke verŝajne nur la kleraj bogomilanoj povis kompreni tian abstraktaĵon — la simpla maso de neperfekta adeptoj certe nutriĝis per ĉiuj legendoj kaj fabeloj.

El la Sankta Skribo la bogomilanoj rekonis: el la malnova testamento la psalmaron kaj la librojn de la profetoj, el la nova — la kvar evangeliojn, la agojn de la apostoloj, la epistolojn de apostolo Paŭlo kaj la Apokalipson.

La bogomilanoj ne kredis pri la oficiale konfesata de la eklezio tripersoneco de Dio, pri la reviviĝo de la korpoj kaj pri la Dia juĝo en la lasta tago. Ili instruis, ke venos la regno de la bono, sed en ĝi ne estos juĝo kaj divido je bonaj kaj malbonaj, sed tiam ĉiuj formos „unu ŝafaron kun unu paŝtisto“.

Kosma kaj multaj tiamaj ortodoksaj verkistoj kredas, ke la modesteco de la bogomilanoj estas falsa, trompa. Kompreneble, ni ne rapidos tuj konsenti pri tio, sed estas iuj atestoj de Zigaben, tre interesaj en tiu rilato. La bogomilanoj, laŭ li, pravigis la mensogon, trompon kaj ŝajnigon, kiam per tio oni celus ion bonan. Kristo mem ja trompis la Satanon, aperinte sur la tero kiel homo. Krome, Kristo paroladis rekte, malkaŝe nur al siaj proksimuloj — al la ceteraj li paroladis per paraboloj, ne rekte. Do, ili sekvas lin, kiam estas bezone. Per tio ili konfirmis la jezuitan regulon: „la celo pravigas la rimedojn“.

Kiel ni vidas, la religiaj konceptoj de la bogomilanoj havas influon en la privata vivo de la individuo, kaj tio estas la unua socia sekvo de ilia herezo.

Ili predikas modestan vivadon, malzorgon pri la korpo, sed ili ne aprobas la asketismon kaj la forkuron el la socio: kontraŭe, ili predikas, ke oni devas resti inter la homoj, ĉar la celo ne estas savi sin mem (tio ja estus tro egoista), sed labori ĝenerale por la savo de la homa animo. Ili malestimas la ermitojn kaj mokas ilin: la enfermiĝintajn en ĉeloj monaĥojn ili nomas moke „vulpoj“, la vivantajn sur kolonoj — „birdoj“.

Ni jam vidis, kiajn konsekvencojn havas la ideoj de la bogomilanoj por la privata vivo de la individuoj, kio estas, kiel mi diris, la unua socia sekvo de la herezo. Ni vidu nun la ceterajn, pli vaste sociajn sekvojn.

La bogomilismo en tiu epoko, kiam la larĝaj popolamasoj estis premataj ĉiurilate, aperis kiel ilia defendanto kaj akceptis la karakteron de revolucia liberiga ideo.

Ni lasu, ke Kosma mem parolu kaj difinu tion:

„Ili instruas al siaj adeptoj ne obei sian reganton, ili blasfemas pri la riĉuloj, la reĝon malamas, insultas la komunumestrojn, riproĉas la boljarojn, konsideras pekaj antaŭ Dio tiujn, kiuj laboras al la reĝo [servute], kaj al ĉiu sklavo ili parolas ne labori por sia mastro“.

Ĉu en tiuj ĉi kelkaj malmultaj vortoj ne ekbrilas fulme la tuta grandiozeco de tiu ĉi instruo? — Konsideru, ke tio estas en la 10-a jarcento, kiam ankoraŭ estis nepenseble en okcidento ekĝermi la ideeto, kiu poste, post jarcentoj, fariĝis la lozungo de generacioj, de popoloj! Ankoraŭ estis malproksimega la tempo de Jan Hus, de Rousseau, Voltaire, Montesquieu, de la granda franca revolucio — kiam en Bulgario sin portas tiu voko por la rajtoj de homo, laŭtiĝas klare kaj difinite la principoj: egaleco, libereco, frateco. Jam en tiuj fruaj tempoj aperas en Bulgario homoj, kiuj ne rekonas la rajton de la reĝo kaj de la regantaj sociaj klasoj utiligi la laboron de la popolo.

Ankaŭ aliajn dokumentojn ni havas pri tiuj ideoj de la bogomilanoj.

En la „Sinodikto de reĝo Borilo“ estas dirite:

„Ili volas, ke estu deprenitaj la bienoj de la episkopoj, monaĥejoj kaj preĝejoj, kiuj estas donitaj al ili de la pravreligiaj reĝoj kaj de la Di-timemaj kristanoj, pri kio ili posedas dokumentojn“.

Do, ili predikas jam en tiu tempo la elpropriigon, precipe de la ekleziaj kaj monaĥejoj bienoj.

En alia dokumento — *Ilovaĉka Kormĉia* — ni legas:

„La bogomilanoj predikas, ke oni ne donu almozon al almozuloj, nek al vidvinoj, nek al orfoj aŭ aliaj mizeruloj, nek al korpe kriplaj, nek al prirabitaj de rabistoj“.

Pri tiu pozicio de la bogomilanoj ni ne povas akcepti, ke pro malbonaj sentoj, malicemo kaj malamo, ili rekomendis tion. Konante iliajn ĝeneralajn ideojn, oni devas konkludi, ke ilia koncepto pri la almozdona helpo estas la moderna nuntempa pozicio, ke per tiu paliativa rimedo la socia krizo ne estas elku-

racita kaj la mizero ne malaperos el la vivo. Ne almozo — alio estas bezona por tio. Kaj la alio n ili montris: rearanĝo de la individua kaj de la socia vivo.

La bogomilanoj estis kontraŭuloj de la milito, de ĉia mortigo kaj de la mortpuno. Ili estis kontraŭ la juĝaj institucioj (tio ĉi estas karaktera trajto de la bulgara popolo ĝis nun: la bulgaro laŭ sia naturo malamas la juĝejon).

La bogomilanoj estis principe kontraŭ ĉia eklezia organizo, sed la vivo instigis ilin mem organiziĝi, por povi sukcesi en sia agado. Ju italo de tiu epoko, Reiner Sacconi, kiu el bogomilano refariĝis katoliko, donas en sia verko iujn informojn pri la bogomilanaj ekleziaj organizaĵoj. Li nombras 16 tiajn, el kiuj la plej gravaj en la movado estis la orientaj: eklezia Bulgariae (aŭ „Ordo Bulgariae“) kaj eklezia Druguriae („Ordo Druguriae“). Inter tiuj du estis ioma diferenco: la bulgara eklezio akceptis plene la moderan dualismon, la druguria — sub la influo de iuj pli ekstremaj herezoj — la absolutan. Ili ambaŭ konkuris inter si por havi influon sur la ceteraj bogomilanaj eklezioj, precipe la okcidentaj.

En ĉiu okazo la organizo de la bogomilana eklezio estis tre simpla kaj tute senigita de ceremonia karaktero. La bogomilanoj en unu loko formis „komunumojn“. Gvidanto de komunumo estis la „avo“ („дѣдьць“).

La bogomilanoj havis tre altan opinion pri si kaj pri sia eklezio. Kiel ĉiuj aliaj herezuloj, ili konsideras sin „veraj kristanoj“ kaj aspiras vivi en la spirito de la primitiva kristanismo. Ili uzis figurajn esprimojn, por karakterizi sian movadon: la bogomilismo estas „tritiko“, dum la instruo de la oficiala eklezio estas „herbaĉo“. La bogomilismo estas la „salo de la tero“. Ĝi estas la „lumo en la mondo“. La bogomilanoj estas „la malriĉaj spirite, la plorantoj, la avidantoj kaj soifantoj je justeco“, kiuj heredos la regnon Dian. La anoj de la oficiala eklezio estas nomataj de ili „sadukeoj kaj fariseoj“. La bogomilana eklezio estas nomata „Betleheмо“, ĉar en ĝi naskiĝis la vera kristanismo. La oficiala eklezio estas nomata „Irodo“, ĉar ĝi celas mortigi la naskitan parolon de la vero.

Kiel alte ŝatis la bogomilanoj siajn konvinkojn, tiel ili sciopovis defendi ilin, kiam estis bezone, kaj eĉ morti pro ili. Ili estis firmaj, obstinaj, neŝanceblaj. Tio ĉi incitas eĉ la cetere paceman Kosma, kiu ĝenerale rekomendas pacajn rimedojn kaj klerigon de la popolo kontraŭ la bogomilismo, malrekomendante la perforton. En tiu okazo tamen li skribas: „Pli facile vi konvinkus bruton, ol herezulon; kaj kiel, se vi pafos sur marmoron, ne nur vi ĝin ne traboros, sed ankaŭ, kiam la sago desaltos, ĝi tuŝos la starantan malantaŭe, tiel same, se vi instruus herezulon, vi ne nur ne konvinkus lin, sed ankaŭ iun el la malfortanimuloj vi infektos“.

(Sekvos la fino)

Al la instruistoj bulgaraj esperantistoj

La fondita dum la pasinta somero Ligo de la Bulgaraj Esperantistoj-Instruistoj estas ankoraŭ tro malforta. Ĝi bezonas la helpon de ĉiu konscia samideano-instruisto. Aliĝu al la Ligo. Se vi mem ne volas pro ia kaŭzo fariĝi ano de la Ligo, sendu almenaŭ vian adreson al la ĉi-sube indikita ligejo por la nun preparata Adresaro de la bulgaraj instruistoj-esperantistoj. Estas necese, ke ni fakuloj pli intense rilatu inter ni kun celo propaganda. Nur organizite ni povus pli efike agi inter la bulgara instruistaro.

Sekretario Ivan Sarafov

str. Mirska, 29 — Kazanlik.

Bibliografio

La principo de la movado por ĉasta vivo, pliklarigita el ideala kaj praktika vidpunkto. Havebla ĉe D. Roskes, Anemoonstr. 96. Hago (Nederl.) prezo fl. 0.30.

Sur 30 paĝoj de ordinara formato estas koncize, bonlingve traktata la grava demando pri la ĉasteco en nia vivmaniero. La movado por ĉasta vivo, celante akceli la seksan purecon de la homoj, akceptas kiel idealon la personan kaj socian purecon de la moroj. Ĝi konsideras la sekskuniĝon ne voluptoĝuo, sed origine kaj esence pluenplantado de la homestaĵoj, kiuj devas do kontraŭbatali la diversajn specojn de la degeneriĝo de la popoloj kaj la kaŭzojn, kiuj ĝin elvokas, kiel ekzemple: pornografion per vorto kaj bildo, onanion, hetero- kaj homoseksualajn kontraŭnaturaĵojn. Estas pledata la kuracista esploro antaŭ la geiĝo, por evitigi al oni eventualan malsanon.

Aliaj libroj pri sekstemoj estas: Instruo por gejunuloj pri seksvivo, de D-ro A. Batek; Al mia fratinetto, de F. Ortt k. a. Avila de Julio Mangada Rosenörn, adreso: Glorieta de Bilbao, 5, Madrid, Hispanio, 64 paĝoj, eta formato, prezo 6 vealoj.

La tuta libro, teksto kaj bildaro, estas kliŝita. Tiu libro ne estas ordinara gvidilo, sed serioza studo pri serio da arkitekturaj artaĵoj kun historia valoro. La libron ilustras belege reproduktitaj bildoj sur luksa papero. Nepre havinda por amatoroj de la konstru-arto.

La aŭtoro anoncas kelkajn nove aperontajn librojn en la sama eldono.

Esperanto, lingvo internacia de I. Muĉnik kaj N. Chavkin, Ierusalem, Palestino. 16 paĝoj, ordin. formato.

Instrua kaj propaganda broŝuro, akompanata de grandformata afiŝego instrua. Ambaŭ en hebrea lingvo.

Esperantuja kanto, teksto de C. Dirksen, muziko de H. Nolthenius. Hago, Anemoonstr. 96 (Nederl.) prezo fl. 0.20.

Katalogo № 2 de Esp. libroj, liverataj de la Laborista Esp. Asocio por la germanlingvaj regionoj. Adreso: Leipzig—Thonberg, Wasastr. 16. Ordinara formato, 16 paĝoj.

Internaciaj gazetoj.

Novaj tempoj, IV j., Aŭg. — Sept. 1925. Monata revuo de edukado kaj instruado. Adr. M. Goldberg, Klemmstr, 14 pt., Leipzig-Co (Germ.). — Kun enhavo interesplena por instruistoj: utila statistikado, fakaj artikoloj, profesia vivo. Instruistoj bulgaraj, subtenu tiun revuon.

Espero Katolika, Nov. 1925.

Fluganta Skribilo, 13. jaro № 38, Nov. 1925. Adr. 9, Bd Voltaire, Issy les Moulinaux, Seine, Francio kaj

Internacia Stenografisto, 3. jaro № 15, Dec. 1925. Adr. kiel supre estas du stenografi-fakaj gazetoj, la unua kun stenografia tekstaro.

La Nova Tago, 1. jaro, № 3. Novembro 1925. Internacia gazeto pri Bahaismo, religia movado. Adr. Oelmühlenweg, 66, Wandsbek (Germ.).

La Unuigita Tuthomaro, Jaro 7. Nov. kaj Decembro. Adr. Tuthomaro, Hamburg 15 (Germ.)

Kristana Espero, № 3—4, 1925. Adr. Pastro H. J. Pätiälä, Vaasa, Raastuvankatu 29, Finnlando. — Religia gazeto, en la spirito de la Biblio.

Esperantista Junularo, Jaro 6. № 29, 30. — Organo de la junuloj. Interalie ĝi informas, ke la skolta Esperantista Ligo projektas Esperantistan tendaron en Ĉeĥoslovakio por 1926.

La Ora Epoko, Jaro 2. № 1, Julio — Septembro 1925. — Kun rubrikoj: Religio kaj filozofio, Scienco kaj inventoj, Socio kaj pedagogio.

La Fervojisto, Jaro 3. № 1—2—3, Aŭg., Sept., Okt. 1925. Adr. Ilija Puhalo, Jezuitska ul. 1. Zagreb, Jugoslavio. — Monata fakrevuo pri fervojo. Reprezentanto en Bulgario: Ignat Nikolov, fervojoficisto ĉe la stacidomo, Sofia.

La Paco, Jaro 4., Okt. 1925. Adr.: Esp. grupo ĉe Otani Universitato, Kioto, Japan. Budisma gazeto, unu numero 32 paĝoj.

Heroldo de Esperanto, VI jaro 9. kaj 12. de Dec., neŭtrala. Adr.: Horrem bei Köln (Germ.)

Libero, j. I, Okt. — Adreso: Ul. Vitoŝa, 48, Sofia.

Nia movado, kiel granda rivero, ĉiam pli kaj pli superakvigas la mondon. Nia lingvo penetris jam multajn regionojn de la vivo, neelŝireble ĝiaj radikoj fiksiĝis en multaj bonaj grundoj, kien falis la benata semero esperanta, ne perforte, kaj tamen, ne repuŝebla.

Ignorate, ofte malfavorate de ŝtato kaj aŭtoritato, niaj apostoloj, la predikantoj de la vorto vivanta, malsupreniris kun sia nobla misio profunde en la popolon por ĝin kulturi kaj klerigi. Kaj tiu popolo ne ilin ignoras, ne ilin malfavoras. Avide ĝi auskultas la belan parolon, la vivantan parolon.

L. Tolstoj, la granda rusa pensulo, estis unu el la unuaj inter tiuj misiistoj. Li kunligis sian nomon kaj personon kun nia afero jam en la frua periodo de la movado. Li verkis artikolon

por la unua Esp. gazeto, kaj pro ĝi la tiama rusa registaro estis malpermesinta la publikan propagandon de Esperanto en la teritorio de la rusa imperio. Kaj, kiel la historio diras, tiu malpermeso efikis senteble malbone por la regula vastiĝo de la lingvo.

Pasis la malnova tempo, ekblovis freŝa, facila vento tra la mondo. Kun la novaj ideoj kiel unuiganta ĉenero hele strias Esperanto. Specialan rolon ĝi ludas en la nova movado por la reformado de la vivmaniero laŭ la Tolstoja instruo. Esperanto penetris ĝin. En multaj gazetoj tra la jaroj estis tradukataj verkoj de Tolstoj, eldoniĝis tiaj en apartaj libroj (mi nur konas ĉirkaŭ 12 da ili), Tolstoj nun estas ĉie konata tra la Esperantista mondo. Tio estas grava, — pli grava ol ni bulgaroj tion povas imagi, ĉar se la slavoj pro lingva parenceco al la rusa popolo povas pli facile influigi de Tolstoj, la samon oni ne povas diri pri Hispanio ekzemple, ĉar la lasta lando laŭ spaco kaj spirito staras tre malproksime de Rusio. Ordinare evidentiĝas necesa peranto. Kaj ĉu Esperanto ne estas la pruvita peranto?

Tolstoj mortis. Liaj disĉiploj inter la esperantistoj daŭrigas lian aferon. Brave. Sindone. Ofereme.

Antaŭ mi kuŝas sep numeroj de „Liberio“. Ili jam formas tutan volumon. Estas nova internacia gazeto por la reformado de la vivo laŭ principoj de la neperforto. Tolstojisma gazeto.

Oni prave diras, ke dank al la neceso, al nia afero prosperos. Nur afero necesa, afero bezonata estas vivrajtigata.

„Liberio“ tuj en la komenco de sia aperado firmiĝis. Ĉirkaŭ 700 abonantoj. Fakto miriganta. Ĉar ja niaj samideanoj ne tre abonemas. Sed „Liberio“ posedas kvalitojn, kiuj vere altigas ĝian valoron.

Ĉe niaj Esp. gazetoj sendube la lingvaĵo ludas gravan rolon. „Liberio“ estas unu el la bone redaktataj. Nur pro tiu cirkonstanco mi nepre rekomendus ĝin. La enhavo estas ĉiam en la spirito de la neperforto. Estas konceptataj la faktoj de la vivo el Tolstoja vidpunkto. La materialo estas tre abunda, pro la amplekseco de la revuo — duobla kiel „Bulg. Esperantisto“; la preso bona. La prezo modera — 60 levoj jare.

Aldone mi diros, ke se ni havus similajn fakgazetojn en ĉiu regiono kaj branĉo de la vivo profesia, idea, kultura, kiaj estas „Sennaciulo“, „Liberio“, „Novaj tempoj“, k. a., ni tiam estus venkintaj.

12. Internaciaj Esperantistaj Ludoj okazos en Santa Coloma de Farnes la 23—25 de Majo 1926. Por la literatura konkurso estas fiksitaj 20 temoj difinitaj kaj 16 laŭvolaj, kun monpremioj. — La verkoj, ne publikigitaj, devas porti devizon kaj esti akompanataj de fermita koverto surhavanta la saman devizon k. entenanta la nomon k. adreson de la verkinto. Templimo: 15. II. 1926. Adreso: S-ro Josep Ventura, str. Greu, 75, Terassa (Hispanio).

Enlanda Esperanto-movado

— Sofia. La Centra komitato grandskale laboras. Por la ĉi-jara „verda“ Esperanto-semajno ĝi presigis kaj dissendis ĉien tra la lando 16000 diverstekstajn propagandafiŝojn. Kvantego da propagandiloj—broŝuroj gazetoj k. a. sendiĝis al 170 urboj k. vilaĝoj.

Okazis granda publika kunveno en la Universitato. Daŭras kelke da kursoj.

La Ministerio de la Publika Instruado per ordono № 4072 de 18.XI 1925. oficigis kiel lektoron de Esperanto en la Instituto por blinduloj en Sofia nian samideanon s-ron Asen Grigorov, redaktoro de „Bulgara Esperantisto“. Nune la dirita institucio estas la nura ŝtata lernejo en la lando, en kies programo estas oficiale enkondukita la internacia helplingvo.

— Kula. Vigla agado. Kursoj: urbana — 40 p.; lernanta — 55 partoprenantoj.

— Vraca. Kurso.

— v. Ŝipka. Kurso.

— Ĉepino-regiono. Kursoj en la vilaĝoj Kostandovo, Dorkovo.

— Teliŝ. Kurso: 56 p. Regiona E.-konferenco. Estas fondita distrikta komitato por la propagando de Esperanto kun sidejo Pleven.

— v. Barkaĉ (distrikto Pleven). Fondita nova grupo.

— Loveĉ. Kurso: 40 p.

— Petriĉ. Kurso: 30 p.

— Ortakjoj. Kurso: 30 p.

— Orjahovo. Kursoj: urbana — 25 p.; lernanta — 40 p.

— v. Beŝlij (regiono Orjahovo). Kurso — 15 p. instruistoj.

— Berkovica. Du kursoj.

— v. Sadovec. Du kursoj.

— Belogradĉik. Kurso.

— Razlog. Kurso — 15 p.

— Plovdiv. Vigla agado. Kurso — 42 p.

— Borisovgrad. Fondita nova grupo — 26 membroj.

— vilaĝoj Pletena. Satovĉe — vigla intereso inter instruistoj; en vilaĝo Dolen (distrikto Nevrokop) kurso — 12 p.

— Peŝtera. Kurso — 30 p.

— Tirnovo. Kursoj: lernanta — 54 p.; turista — 30 p.; urbana — 30 p.

— Kazanlik. Kursoj: lernanta — 30 p.; urbana — 8 p.

— Sliven. 3 kursoj por lernantoj.

— Orĥane. Fondita nova grupo lernanta — 50 membroj. Kurso.

— v. Ĉilnov (regiono Bela). Kurso.

Redakcia Komitato:

Asen Grigorov — Zahari Zahariev

ANONCOJ

estas pagataj 2 bulgaraj levoj por cm.

Atentu samideanoj!

Ciu juna Esperantisto devas esti ano de la tutmonda Esp. Asocio Junulara, kaj ricevi la monatan gazeton „Esperantista Junularo“ kiu estas la plej leginda kaj legenda de ĉiu juna esperantisto. Favora abonprezo por bulgaroj 60 levoj.

Por pliaj informoj la samideanoj estas petataj sin turni al
GEORGI HRISTOV, Dobrička, 20, Varna.

Petante informojn oni sendu poŝtmarkon dulevan por respondo.

Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara

The British Esperantist

estas la oficiala organo de la Brita Esperanto-Asocio.

Aperas la 15. de ĉiu monato. Kun multaj informoj. Interesa por anglalingvuloj.

Adreso: 17, Hart Street, London, W. C. 1 (Britlando).

Itala Esperanta Revuo

estas interesa, belaspekta kaj riĉenhava monatgazeto, redaktata en Esperanto kaj en itala lingvo.

Interesatoj pri la itala popolo, pri ĝia vivo kaj moroj abonu tiun gazeton.

Adreso: S. Vito al Tagliamento.

Aŭstria Esperantisto
Flowergasse 12-2-13
Kornenburg
Aŭstrujo
Abcunus.

Legu

OK NOVELOJ

Verkita de la fama angla aŭtoro ARNOLD BENNETT,
Tradukita de A. E. Wackrill.

Enhavas lerte verkitajn rakontojn pri
la ANGLA VIVADO KAJ SPORTO.

124 paĝoj.

Prezo: 1.50 Svisaj frankoj.

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO,

17 Hart Street, London, W. C. 1 Anglujo.

BULGARA ESPERANTISTO
Sofio-str. Car Boris, 69